

KOMENCANTO

revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Solomin Nikolaj [Ŝadrinsk, Rusio]

La tempo somera...

2005

Kiel Paul Gubbins, konata E-verkisto iĝis esperantisto
verkoj de niaj legantoj — gramatiko serioze kaj amuze — aforismoj
anekdotoj — la praktiko — ripozejo — korespondu!

3

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, IP10 0LA

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvorůka 1, CZ-696 62 Strůžnice

Ĉinio Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037, Beijing

~ S-ro Cui Jiayou, P.O.Kesto 448, Lixin 158120, Jixi, Heilongjiang

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.

Estonio Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.

Finnlando Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Sceger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv. Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio Višnja Brankovič

Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

Irlando Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Japanio Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havano

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

Nov-Zelando David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Portugalia Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A., 1500 Lisboa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum, Husarlyckevagen 29, SE — 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schledorn 6, CH --- 4224 Nenzlingen

Usono Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

Redakcie

Karaj legantoj!

Ni petas pardonon, ke ĉi tiuj du numeroj aperis kun prokrasto! Ni kore dankas niajn fidelajn legantojn, kiuj skribis, ke senpacience atendis la revuon, tiujn, kiuj ne forgesas pri ĝi, ec troviĝante en malsanulejo kaj tiujn, kiuj reagis al diversaj publikajoj en la revuo – vere ne povas esti pli granda subteno!

La vivo, kiel ĉiam, rapidkuras kaj estas plena de diversaj eventoj. Jen venis longeatendita de ĉiuj somero kaj ĝojigas nin per suno, per maro de floroj kaj per someraj aromaj odoroj! Baldaŭ multaj vojaĝos kaj havos plezuron vidi mirindajn kaj interesajn lokojn. Ni deziras, ke muzo de foraj vojaĝoj akompanu vin kaj esperas legi viajn novajn verkojn!

Ni ankaŭ esperas, ke tiu ĉi numero ne enuigos vin, karaj abonantoj, ĉar la redakciaĵoj sincere penis prezenti al vi interesajn materialojn kaj kolektis ilin laŭ diversaj gustoj.

En la rubriko "Kiel tio komenciĝis" ni, kiel ĉiam, prezentas al vi neordinaran personon kaj elstaran esperantiston el Britio Paul Gubbins kaj vi eĉ povos konatiĝi kun liaj saĝaj kaj kuraĝaj ideoj pri originala dramarto en Esperanto. Sur paĝoj de rubriko "Verkoj de niaj legantoj" vi renkontiĝos kun interesaj kontribuoj de niaj malnovaj legantoj Santi Elena Bullo el Italio kaj Aleksandr Masiukas el Rusio kaj kun tre simpatia debuto de juna aŭtorino el Moskvo – Lumanta. Ŝi provas trovi en homa koro tion, kio restas hela kaj ne perdiĝas en la bruoj kaj malpaco de nuntempa vivo. Nin mem ravis tiu ĉi rakonto, aŭtora tonakcento kaj stilo de verkado.

Ni esperas, ke vian intereson vekos ankaŭ materialoj sur gramatikaj paĝoj kaj instigos vin al perfektigo de la lingvokono. Tradicie numero enhavas sufiĉan distran parton kun multaj ŝercoj, anekdotoj, aforismoj.

Espreble ke vi ne nur trarigardos la revuon, sed, legante ĝin, haltos ie, meditos kaj eĉ ekvolos reagi...

Rafija Kudrjavceva

KOMENCANTO

2005 numero 3 // (53) // 6 numeroj jare
regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto Raja Kudrjavceva
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2005:

internacia tarifo: 15 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: 12 eŭroj;

konto ĉe UEA: ykud-a

rusia tarifo: 150 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. яш. 132.

Konata E-verkisto, redaktoro de "La Brita Esperantisto", kunredaktoro de "Monato", aŭtoro de lernolibroj en Esperanto, inter kiuj estas OSIEK-premiita lernolibro "Kunvojaĝu!"


Ne ĉiam fidu la gepatrojn ... kaj neniam forĵetu libron

Mi emas ĉiam diri, ke ne mi trovis Esperanton, sed Esperanto min. Klare, mi tiel iomete troigas ... sed, vere, ne multe. La situacio jenis. Kiam mi estis studento, en mia naskolando Britio, mi aĉetis esperantan lernolibron. Kelkajn tagojn poste mi estis leganta la libron, kiam eniris la ĉambro, kie mi sidis, mia patro. Mi entuziasme montris al li la libron. 'Fu,' li diris. 'Neniu parolas Esperanton. Vi malŝparas al vi la tempon. Koncentriĝu pri viaj studoj pri la germana, la franca.'

Mi, stultulo, naivulo, kredis lin. Juĝis, verdiktis ŝajne ĉiopotenca, ĉiamprava patro: kiu estis mi, por kontraŭstari? Kaj tiel restis la afero dum preskaŭ 20 jaroj. Sed tiam, kompletiginte miajn studojn en Britio, Germanio kaj en Kanado (kie mi doktoriĝis pri germana literaturo), fariĝinte ĵurnalisto kaj poste universitata instruisto, mi trovis, komence de studjaro, ke mi respondecos i.a. pri tri apartaj komencanto-grupoj en la germana lingvo.

Mi do diris al mi, ke estus bone, se mi denove eklernus lingvon. Tiel mi povus pli bone kompreni la fojajn frustraciojn de tiuj, kiuj ekesploras novan lingvon. Mi intencis ekstudi la italan, ĉar plaĉas italaj – kaj aliaj – operoj. Tiucele mi ĝimpris en la subtegmentejon por elskatoligi iam aĉetitan sed poste neglektatan lernolibron pri la itala. En la subtegmenteja duonlumo la skatolon mi malfermis, enmetis manon, kaj elprenis – jes, vi divenis – la mistraktitan, kalumniitan esperantan lernolibron, kiun mi akiris kiel studento.

Forflugis ĉiuj pensoj pri la itala (ne priploru: mi estus restinta en tiu ĉi lingvo sendube eterna komencanto); enflugis memoroj pri la interrompita Esperantoleciono kaj pri la maljusteco, kiun faris al la lingvo mia patro. Eble patroj, pro kialoj neklaraj, sentas sin minacataj de



Esperanto. Ĉu ne la patro de Zamenhof, almenaŭ laŭdire, provis brule bridi la lingvan entuziasmon de sia filo?

Tial, elskatoliginte la libron, mi opinias, ke ne mi trovis Esperanton, sed Esperanto min. Eble mi tro sentimentale, tro romantike prijuĝas. Sed plaĉas al mi kredi, ke la libro paciencis, fidele min atendis. Kun kreskanta plezuro mi studis la enhavon de la libro, paŭzante de tempo al tempo por malbeni la momenton, kiam mi pro troa kredemo al la patro demetis la libron, kaj bedaŭrante la perditajn jarojn, dum kiuj mi estus povinta kiel studento pli libere esplori la mondon helpe de Esperanto. Tiam, krom Esperanto, mi lernis du

aferojn: ne ĉiam fidu la gepatrojn kaj neniam forĵetu libron.

Poste, mia mondo fariĝis esperanta. Jam studinte la gramatikon, sed ne multe parolinte la lingvon, mi partoprenis la ĉiujaran Esperantosomerlernejon brile organizatan de doktorino Marjorie Boulton en Barlastono, Britio. Mi komencis la semajnon, multon komprenante sed nur balbute min esprimante. Fine de la semajno mi iris al d-rino Boulton – mi kristalklare memoras la momenton: la lernejoj sidis, trinkante, en la esperanta drinkejo 'La Verda Stelo' en la apud-barlastona urbo Stoke-on-Trent – kaj dankis ŝin, pro tio, ke ŝi 'donis' al mi novan lingvon,

ĉar ene de unu semajno mi ne plu balbutis sed jam sufiĉe flue parolis. Evidente, ne la doktorino 'donis' al mi la lingvon, sed per sia genio la doktoro – Zamenhof. Post kelkaj jaroj mi sufiĉe progresis por transpreni respondecon pri la somerlernejo, en kiu mi trovis mian esperantan langon.

Intertempe mi komencis artikoli por 'Monato', kiun mi daŭre faras kaj nun ankaŭ kunredaktas (aparte ĝuinda okupo, ĉar tiel en Esperantujo mi daŭrigas mian ĵurnalistan karieron); mi verkis lemolibrojn, precipe 'Kunvojaĝul', kiu gajnis OSIEK-premion (lastatempe mi turnis min al elektronikaj lingvaj ekzercoj kaj produktis la KD-on 'Verdaj voĉoj', kiu surhavas film-intervjuojn kun esperantistoj kaj kunligatajn lingvo-ekzercojn; kaj mi verkis la filmlibron de la vidbendserio 'Pasporto al la tuta mondo' (sendube la plej longa dramo en Esperanto).

Krome mi redaktas 'La Brita Esperantisto', la revuon de la Esperanto-Asocio de Britio; mi artikolas pri literaturaj temoj (ekz. en la revuo 'Fonto'); mi organizas kursojn; kaj mi verkas teatraĵojn.

Kial verki teatraĵojn en Esperanto? Mankas originala teatra tradicio en Esperanto: mankas teatroj, mankas publiko, mankas – krom kelkaj esceptoj – aktoroj.

Evidente, nur frenezulo verkas esperantajn teatraĵojn, kies ŝancoj pri surscenejigo egalas al tiuj de elkaĝigita kanario en ĉambro kun kato. Estas ja ŝanco ... sed eteta. Mi do verkas pro propra plezuro, pro propra frenezeco, kaj pro la estonteco. Mi firme kredas je Esperanto, firme kredas, ke venos tempo, kiam la esperanta popolo estos sufiĉe multnombra kaj sufiĉe matura por bezoni kaj aprezi, kiel aliaj popoloj, dramarton – aparte sian propran kaj ne, kiel nun, tradukitan.

Eble pro tio, pro miaj krudaj dramaj provoj, Esperanto trovis min. Tamen mi ne aparte fidus je sorto aŭ destino; en mia vivo pli gravan rolon ludis hazardo. Ankaŭ ĥaoso. Kaj ordigi ĥaoson estas unu el la taskoj de dramisto. Simile, en la eltiraĵo de unu el miaj unuaktaĵoj, 'Nun ni parolu' (provprezentata, parenteze, en La Kvinpetalo, Francio, dum tiea teatro-staĝo en 2001), la radio-raportisto Fredi provas ordigi la sonplenan mondon, kiun li kunkreis. Miskomprenas lin lia patrino, Kristina; kontraŭas lin la radiostacia ĉefino, Fenela. Ĝuu!

Paul Gubbins [Congleton, Britio]

(Fenela kaj Kristina rigardas unu la alian, atendante pliajn eldirojn de Fredi)

Fredi Tro da bruoj. Muziko, babilado ... konstante, senĉese. Neniom silento ... silento, kien forfuĝi. ... kie aŭskulti sin mem. Estas ja tro ... mi ne plu eltenas ...

Kristina Bone, kara. Diru ... senpeziĝu.

Fredi Ni ĉiuj kulpas ... tamen neniu pli ol mi. Ĉar mi atencas silenton ... plenigante ĝin per sonoj ... stultaj, sensencaj sonoj.

Fenela Halt! Ĉu vi volas diri ... ?

Fredi Mi volas diri ... ke mi estas murdisto.

Kristina Ne parolu stulte, Fredi. Vi ne kapablas murdi.

Fredi Silenton mi murdas. Ĉiam, ŝaltante mikrofonon ... ekparolante ... mi murdas silenton. Imagu: mia voĉo ... kruda tranĉilo, per kiu mi dishakas la sanktan silenton, kiu nin volbe, volve vualas. Tiel mi disfendas, disŝiras ĝin ... dum grandaj sango-gutoj ... silento-sango ... plaŭdas ĉirkaŭ la oreloj.

Fenela Se vi drinkis ... se vi ebrias ... mi do memorigu vin, ke laŭ la kunlaboranto-kodo ...

Fredi Drinkis? Memevidente mi drinkis! Mi ĉerpis el la profundaĵoj de mia konscienco ... mia konscienco, el kiu mi devintus ĉerpi antaŭ jaroj.

Kristina Sufiĉas, Fredi. Ni hejmeniru ... vi ripozu ...

Fredi Ne! *(Irante al Kristina)* Mi jam dumvive sufiĉe ripozis. Nun ... jam estas tempo, ke oni ekparolu ... ho! kia ironio! ... ekpledu por silento.

Fenela Mi volas, ke kuracisto ekzamenu vin. Poste ... jes ... ni aranĝos konvenan pension. Sen-skandale, kompreneble. Neniu scios ...

Fredi Mi volas, ke ĉiu sciu! Ke la tuta mondo konsciĝu!

Al kiu aldonendas nur, ke mi volas, ke la tuta mondo konsciĝu pri la miraklo, kia estas Esperanto.

Karaj legantoj! Sur la najbara paĝo vi povas ankaŭ konatiĝi kun la konsideroj de Paul Gubbins pri originala dramarto en Esperanto.

Kiel rompi cirklon de skeĉismo

Do kiel rompi la cirklon de skeĉismo, amatorismo, ĉarlatanismo, kiuj pelas reĝisorojn al pruvitaj, konataj tradukaĵoj, kio siavice senkuraĝigas Esperanto-dramistojn, kiuj kredas neniam vidi enscenigataj siajn originalajn verkojn, kaj kio siavice estigas vakuon plenigotan denove de skeĉismo, amatorismo kaj ĉarlatanismo? Do, unue, oni volu subteni propran kulturon kaj kredi, ke valoron ĝi havas; krome oni volu akcepti, ke kulturo, kiu sin neas, kiu sin ne arte spegulas, esploras, kiu male ĉerpas el aliaj kulturoj koste de la indiĝena, funde ne estas kulturo, ĉar – simple – ĝi fremdas al, ne fontas el, sia komunumo. Due, oni akceptu, ke dum jaroj, jardekoj, jarcentoj eĉ, la kvalito de verda dramo plej verŝajne ne atingos eĉ la mezumon de nacia dramarto (sed rimarku, ke en la kampo de poezio, eble en tiu de la romano, esperantistoj ne atendis tiom longe). Kaj trie, oni pretiĝu traserĉi la ekzistantan dramon kulturon, jes elĵetante la fatrason, sed jes konservante la sendubajn valoraĵojn, kiuj certe troveblas, kaj kiuj formu fundamenton de verda dramarto, sur kiu eblos – espereble – ekkonstrui novan, kaj originalan teatran tradicion.

Kie komenci? Kiel komenci? Kaj kiam komenci? Nu – oni komencu nun, esplorante la teatran heredaĵon, kiun ni posedas. En mia teatro-kolekto mi posedas pli ol 250 originalajn Esperanto-teatraĵojn. Inter tiuj estas ridindaj galimatioj, kiuj, se verkitaj nacilingve, neniam estus publikigitaj. Memoru, ke en la 'reala' mondo, teatraĵo estas profesie provludata kaj polurata,

antaŭ ol fariĝi fiksita en presita formo; male en Esperantujo, kie teatraĵoj – aŭ t.n. teatraĵoj – plejparte iras rekte de komputilo aŭ skribomaŝino al paĝo aŭ libro, ne vidinte aktorojn, teatron aŭ publikon. Tamen en mia kolekto estas gravaj specimenoj de nia teatra heredaĵo: prezentindaj, spektindaj pecoj, kiuj riĉigus artajn vesperojn en Esperantujo multe pli – miaopinie – ol 'fremdaj', tradukitaj dramoj.

Do neniu diru, ke ne valoras, ne ekzistas originala dramarto en Esperanto: jes, ĝi ekzistas, jes ĝi kvalite ekzistas – se ja etskale – tamen nepras, ke la esperantistaro ĝin agnosku, por stimuli, por kuraĝigi plian kreadon. Pro tio nepras, ke UEA helpu starigi trupojn, kiuj pretas prezenti originalajn dramojn en Esperanto. Tiam, kiam dramverkistoj vidas, ke estas garantiata publiko, ili ekverkos pli entuziasme, pli fekunde, pli – espereble – profesie, por komplezi al la deziroj, la bezonoj de la esperantistaro. Siavice la verda popolo komprenu, ke ni ankoraŭ ne posedas nian Shakespeare-on – sed sen floranta, vivanta teatro-tradicio ni neniam tiun trovos.

Kaj se vi daŭre dubas pri la graveco de originala teatra tradicio, kontraste al nura tradukita, aŭskultu la rezonadon de unu el la pioniroj de esperanta dramarto, Nadina Kolovrat. En parolado ĉe la pariza universitato Sorbonne en la unua jardeko de la 20a jarcento ŝi diris: 'Traduki estas moveti senfine ombrojn de pasinto, revivigi mortintajn rememorojn, estingitajn impresojn, penojn; sed Esperanto havas alian destinon de vivo, kuraĝa aktiveco, necesa batalo pri novaj veraĵoj, devante formi propran larĝan literaturon, propran evangelion de novaj kredoj... Tradukoj ... povas esti necesaj, kiel instruo pri ĝusteco de esprimoj, aplikado de gramatikaj reguloj, donado de ekzemploj de ĝia fleksebleco kaj en tiu rilato povas esti utilaj, sed tio estas demandoj sole de formo.... Nur per literaturo ni povas elmeti nune niajn bezonojn, nur per ĝi prepari larĝan kampon de ideoj por venontaj majstroverkoj de venonta arto kreota de lingvo konplena, kuraĝeformita, nedependa de pasintaj antaŭjuĝoj, antaŭordonoj. Esperanto estu do nia rimedo, nia ilo, nia espero atingi tiun celon'.



Vinnikova Nina [Novoaltajsk, Rusio]

*Tiu ĉi originala verko estas debuto de nia nova aŭtorino el Moskvo. Ni trovis la rakonton tre aktuala en nuntempa situacio de malpaca mondo kaj samtempe estis ravitaj per ĝia neatendita kaj es-
periga finaĵo. Ĝuu!*

Lumanta [Moskvo, Rusio]

Danĝeraj tempoj

Li estis nura aerluko por la okuloj en plenŝtopita vagono: aĝa sinjoro, kalviĝanta, vestita en griza lana palto el sub kiu videblis nemoderna kostumtrio; li havis longan verdan skarpon kaj okulvitrojn. “Tipa kreinto, - ŝi pensis, - sed por kio li veturas en metroo dum amashoro kun tiom da pakaĵoj?..”.

Matene la ĉefa astrologo de elsendo “Ĉiamveraj prognozoj” promesis, ke hodiaŭ ŝin atendas grava renkonto. “Ridinde!, - ŝi pensis. - Kiuj povas esti renkontoj, se dum tutaj semajnoj neniun mi vidas krom propran respugulon... Eble, temis pri tiu sinjoro?.. Eble, li hazarde veturos ĝis mia stacio?.. Stulta revulino!”.

Subite la kreinto rapide leviĝis, mallerte kaptis sian grandegan valizon, du sakojn kaj longan ombrelon kaj pene eliris el la vagono, senhelpe pardonpetante. En tiu ĉi momento ŝi rimarkis, ke la sinjoro lasis malgrandan brunan kesteton. Kaj ŝi estis certa, ke precize en tiu ĉi kesteto troviĝas io la plej valora por la kompatinda kreinto. Ne pensante kion ŝi faras, ŝi rapide atingis la skatolon, ĝin prenis kaj elkuris sur la metrokajon. Sed pri kio ŝi esperis je la sepa vespere en nia metroo? Certe, homamaso por ĉiam absorbis la distriĝeman sinjoron.

Dum kelkaj minutoj ŝi staris, penante kompreni, kial ŝi perdas la tempon ĉi tie, premante en la mano fremdan kesteton (kiu, interalie, havis tre oportunan tenilon) anstataŭ rapidi hejmen post peza tago kiel miloj da normalaj homoj ĉirkaŭe. Kaj tiumomente ŝi ekaŭdis: “Estimataj pasaĝeroj, estu atentemaj! Cele preventi terorajn agojn, okaze se vi trovos suspektindan aĵon en vagono aŭ en stacio, tuj raportu pri ĝi al la deĵoranto aŭ al policisto!”.

Ŝi ŝtoniĝis: “Kion mi faris?! Kion, damne, mi havas ĉe mi?..”. Negranda bruna skatolo ne estis peza, sed tute sufiĉis por enteni kilogramon da eksplodaĵo, aŭ eĉ du! “Kaj kion mi nun faru? Mi ja ne povas simple lasi ĝin ĉe la muro kaj forveturi! Sendube, iu rimarkos tion kaj tuj ili min arestos – jen kiom da policistoj vagas sur la metrokajo! Kaj, certe, neniu kredos je mia stulta historio, - mi mem ne povas min kompreni!..”. Kaŝe, por ne vekti suspekton, ŝi esplorigardis sian trovaĵon - la kesteto, fakte, estis vere suspektinda: unu ĝia flanko estis strange kradita, sed nenion ŝi sukcesis ekvidi transe, kaj tiu speciala tenileto por porti... “Aliaflanke, se ĝi ankoraŭ ne eksplodis, kial ĝi ne atendu ankoraŭ dek kvin minutojn? Nun super mi estas Ruĝa Placo, sed kiam mi atingos mian stacion, mi povos meti ĝin ien sur nian senuzan terenon por ke la eksplodo neniun suferigu”, - rapide ŝi enŝoviĝis en la trajnon. Dum la vojo ŝi penis ne pensi pri tio, kio povas okazi ĉiumomente, malgraŭ oni kelkfoje memorigis la pasaĝerojn pri suspektindaj aĵoj kaj teroristoj. Ŝi elpensis idealan lokon por lasi la bombon (tie oni nek promeniĝas hundojn, nek drinkas) kaj iomete trankviliĝis.

Ekstere estis mallume kaj pluvis. Certe, ombrelon ŝi ne havis, kaj subite ŝi ial eknervumis pri la sorto de kesteto – baldaŭ ĝi restos tute sola en pluvanta nokto...



— Saluton! Kion vi faras ĉi tie?

Ŝi ektemis pro la laŭta voĉo de sia najbaro. “Damne! Kial ĝuste nun!”, - ŝi volegis tuj malaperi.

— Iras hejmen, kiel vi, - ŝi murmuris, - ĉu vi ne memoras, ke ni loĝas en apudaj loĝejoj?

— Certe, mi memoras!.. Sed kial vi ne malfermas la ombrelon? Ja pluvegas!

— Ĉar mi ne havas ĝin eĉ hejme, se vi ankoraŭ tion ne lernis.

Kontraŭvole ŝi kaŝis sin sub lia granda ombrelo kaj prenis lian brakon.

— Ĉu mi helpu pri via pakajo?

— Ne! Mi mem bone kapablas!

— Nu, kiel vi volas, ĉiam fieraj kaj sendependaj!

Li moketis. “Diablo lin prenu! Kial li min enuigas!”.

— Kio pri via disertacio? Ĉu baldaŭ estos farita? Mi jam rakontis al ĉiuj en mia laborejo, ke mia najbarino skribas disertacion pri tradukaj specifikoj de monduma variaĵo de Latina lingvo.

— En via banko? Mi pensis, ke oni interesiĝas nur pri mono en bankoj!

— Tute ne! Miaj kolegoj estas tre intelektemaj, kelkaj el ili eĉ envieta, ke mi havas tian saĝan najbarinon.

“Se ili scius, kiom oni pagas pro mia saĝeco, ili tuj ĉesus enviil!” - ŝi mokridis interne.

Ŝi ne volis tion laŭdiri por li denove ne incitu ŝin per proponoj pruntedoni monon aŭ fari riparon en ŝia loĝejo. Li ripetas tion ĉi-foje kiam li alvenas por peti iun libron aŭ peti ŝian permeson alporti al ŝi ion de bazaro. Iufoje ŝi permesis...

— Haltu, mi ekfumos, - ŝi eltiris almetojn, sed li jam donis al ŝi la fajrilon emblemitan per lia fama banko. “Por kio li ĝin havas - li ja ne fumas?.. Verŝajne, speciale por mi.” Li riproĉe kapturis ekbruligante ŝian cigaredon:

— Kial vi denove promenas sub pluvo en tiuj ĉi malvarmaj ŝuoj? Iam vi nepre mal-saniĝos!

— Ho, Dio! Rakontu pli bone kiel fartas via onklino, ĉu ŝi vizitis vin antaŭnelonge?

— Jes, ĝuste! Kaj ŝi alportis tiom da donacoj: girlandojn el sekigitaj fungoj kaj produktojn de ŝia ĝardeno (imagi, ŝi havis bonegan rikolton de rafanetoj ĉi-jare!) kaj bongustegan fruktbrandon kaj...


Ili delonge preterpasis la idealan lokon kie ŝi intencis lasi la bombon, sed ŝi ne plu volis. Post paroloj kun li ŝi ĉiam iĝis apatia; nun sola ŝia deziro estis kiel eble plej baldaŭ demeti la malsekajn ŝuojn.

— Bonan nokton! Kaj venu gustumi la fruktbrandon!

— Nepre! Dankon pro la ombrelo!

Liftpordoj fermiĝis kaj ŝi finfine estis sole kun la kesteto. Ŝi denove ĝin pririgardis: “Se vi estus la bombo, vi jam eksplodus kiam mi fumis, - ŝi laŭdiris por memsugesto. - Sed, eble, la eksplodaĵo simple malsekiĝis... Nu, eĉ se tiel, tutegale mi havas nenion por perdi krom mian saĝecon... Sed antaŭe mi surmetos la lanajn duonŝtrumpojn, mi ne volas morti kun malvarmegaj piedoj!”.

Ŝi facile trovis la serureton kaj impete malfermis la skatolon. Ene estis erinaco. Li rigardis al ŝi per rondaj nigraj okuletoj, ĝojante esti malsekretigita. Ŝi ne plu estis sola...



bildoj de Naila Sadretdinova [Voroneĵ, Rusio]

Responde al nia propono pli aktive reagi al publikajoj en la revuo, sendante laŭdezire siajn rakontojn, verkojn, meditojn kaj bildojn je diversaj temoj, la redakcio ricevas reeĥojn, dankas kaj ĝojas pro reciproka ligo inter revuo kaj la legantoj.

Esperantigis Masiukas Aleksandr [Murmansk, Rusio]

Ĉu amo estas malsano?

Mi delonge ne kontribuis por "Komencanto". Sed jen, estante en la malsanulejo pro malsano, mi ial rememoris la kanteton el malnova soveta kinofilmo "Ironio de l' sorto". Kial? Tio ne klarigeblas. Eble influis printempa humoro malgraŭ tio, ke ni ĉi tie havas tute vintran veteron. Kaj mi esperantigis unu strofon:

*Mi ĝojas, mi malsanas ne je vi.
Mi certas, ne je mi ja vi malsanas.
Revante sub la luno ne pri mi,
Ne min vi pense hejmen akompanas.*

Malsanas? Ĉu amon oni povas konsideri malsano?

Sed jen alitage trafis en miajn manojn murmanska eldono de la populara gazeto "Komsomolskaja pravda", kiun mi neniam aĉetas kaj tre malofte legas. Eĉ du paĝojn sub titolo "Ĉu amo estas malsano?", tajpita per grandaj ruĝaj literoj, ĝi disponigas al ĉi temo.

Mia maldekstra okulo estas operaciita kaj kovrita per gaza kurteneto. Sed legi eblas per la dekstra. Mi tralegis. Mi kuraĝas proponi iom mallongigitan rerakonton de ĉi artikoleto ankaŭ al la "K"-legantoj. Ja vere venis printempo, venas ĉiuspecaj someraj aranĝoj. Ŝajnas, ke temo iĝas aktuala...

Oni diras, ke la tutmonda sanprotektita organizo asertas, ke AMA STATO estas infekta malsano. Do, eblas infektiĝi. Precipe printempe.


AMO estas transformita stato de la konscio. Laŭ medicinistoj enamiĝo estas akuta patologio kaj amotransiro de la malsano al kronika formo. Homa kapablo ami estas kvintesenco de l' personeco. En ĝi evidentiĝas la plej ekstremaj trajtoj de homa karaktero.

La psikologoj de la universitato Jels pruvis, ke aperinta en la kolektivo enamiĝinta paro infektas ĝin. Ĝis 30% de kunlaborantoj enamiĝas. Iuj fluidoĵoj transportas la infekton.

Laŭ la faktoj de profesoro-socialogo el Berlina universitato Dieter Prost:

- la viroj forte enamiĝas 4-5 fojojn en sia vivo;
- 3-4 fojojn "ĝis la oreloj" enamiĝas la virinoj;
- 10% de geviroj asertas, ke veran amon spertas nur unufoje en la vivo;
- 10% de ili havas tiom fortan imuniteton, ke neniam spertas aman senton.

Oni distingas ses specojn de la amsent:



Suvalov Aleksandr [Bjisk, Rusio]

1. "Agape" - pura, karesa amo. Ekflamas subite, daŭras mallonge sed profunde, sinforĝese pardonante ĉion. La amantoj ofte okazas trompitaĵoj de la amitoj. Laŭ ĉi principo evoluas la unua amo.

2. "Stroge" estas amo-amikeco. Evoluas longe, tra multaj elprovoj. Ĝin detruo ofte ne povas eĉ perfido de la partnero. Ĝi konstruiĝas sur reciproka estimo kaj zorgo. Ofte ne finiĝas per geedziĝo, sed estas sento, por kiu decas vivi.

3. "Pragma"- amo profitcela. La partneroj longe pristudas unu la alian laŭ karaktero, intelekto, enspezoj, vivkondiĉoj / loĝejo/... Ofte elkreskas vera plenvolora amo, unuiganta la homojn por longa tempo.

4. "Manio" - freneza sento ekde l' unua rigardo, tre impeta kaj jen eŭforia, jen malespera. La enamiĝinto suferas mem kaj suferigas la partneron. Ofte ĝin akompanas depresio. Ĝin eblas nomi neŭrotika ruiniĝo.

5. "Ludus" estas amludo. Oni ne zorgas pri profunda sento, sed nur pri ekstera formo. Afabla sento, kiun estas poste agrable rememori, sed ankaŭ facile forgesi, kiel mallongan dumripozan romanon.

6. "Fros" - seksa altiro. Ĝi estas pli karaktera al la viroj. Post la atingo de la celo, post la "venko" la sento estingiĝas ĝis kiam aperos sur la horizonto nova "fortikaĵo".

La plej doloraj oni konsideras AGAPE-on kaj MANIO-n: la unuan - al la enamiĝinto, kiam venas tempo, ke "rompiĝas la rozkoloraj okulvitroj", la duan - al ĉiuj, eĉ al la ĉirkaŭantoj.

Jen kelkaj simptomoj de la ammalsano:

— nekapablo koncentriĝi je io krom la pensoj pri l' amato;

— tute forestas apetito aŭ male — oni seninterrompe deziras iom manĝeti;

— malbona humoro, senkaŭzaj kapdoloroj, sento de laciĝo;

— sendormeco, oftaj dormointerrompoj, strangaj songoj;

— alergiaj reakcioj;

— korbato, ŝvitado, mantremado, interna ardo aŭ malvarmo...;

— pensoj pri sensenseco de la vivo se forestas reciprokeco.

Ĉu eblas kuracado? Jes. Sed unue oni mem analizu la sentojn, - se ili malhelpas en la vivo, ne estas akcepteblaj-decidu liberigi de ili mem aŭ kun helpo de la kuracisto psikoterapeŭto.

Mi ne tradukis la tabelon, en kiu oni analizas, kio okazas en la organismo de la enanimiĝinto dum diversaj stadioj de la malsano. Ĉu estas iuj pozitivaj konkludoj? Jes. La enanimiĝintoj je 40% pli malofte suferas je inflamaj malsanoj kaj resaniĝas pli rapide. Preskaŭ je 30% ilia imuneco pli sukcese kontraŭstaras la gripon. Dank' al la hormono de ĝojo - endorfino.

Sukcesojn al vi ĉiuj! Bonan kaj amplanan printempon kaj someron!

Amike,

Aleksas Masiukas.

La originala verko de nia malnova legantino kvazaŭ daŭrigas la temon kaj prezentas alian formon de am-sento, t.n. "ne "eldiritan" amon.

Santi Elena Bullo [Mestre, Italio]

En la somera bela tago

Estis varmega tago. La juna Roberto malrapide promenis laŭ la placo de Sankta Marko. Lia reveno en Venecion por kelkaj feriaj tagoj fin-fine realiĝis. Dum multaj jaroj li loĝis en Romo pro siaj laboraj kialoj. Kaj nun, kun senfina plezuro li povis meti siajn piedojn sur la ŝtonojn de sia naskiĝurbo.

— Ho, kiun ni vidas! – du ĉarmaj junaj sinjorinoj vekis lin laŭ la nomo.

Agrable surprizita, Roberto rekonis ilin. Tio estis Sara kaj Lina, du fratinoj, kiuj loĝis iam najbare al lia venecia domo. Post kutimaj salutoj la gejunuloj preferis eksidi en la kafejo apud la kolonoj antaŭ la baseno.

Estis tre amuze rigardi kiel navigas malgrandaj ŝipoj kaj nigraj gondoloj sur la verda akvo, kiu rebrilis al la suna lumo. Trinkante aroman kafon, la ĉeestantoj plezure komencis longan interparoladon pri la familiaj kaj geamikoj.

Roberto atente kaj prudente aŭskultis, poiome proksimiĝante al la temo, kiu lin interesis. Eble la fratinoj sciis iujn novaĵojn pri la kuzino Marion, kiu iam loĝis najbare...

— Jes, - diris Sara, ŝi forveturis al Lienz, kie laboras ŝia patro.

— Mi scias, ke la kuzino jam de kelkaj jaroj edziniĝis. Nun ŝi laboras en apoteko, - finis Lina.

Roberto silentis, sed li eksentis, kvazaŭ io brulanta lokiĝis en lia koro. La Granda Sonorilo de la placo frapis la horojn.

— Kia domaĝo! Tro rapide pasas la tempo, - diris Sara. – Nin atendas la onklino, kaj ni devas ankoraŭ aĉeti florojn por ŝia festo.

La gejunuloj kore adiaŭis kaj la fratinoj eliris el la kafejo kaj direktis sin al la fundo de la placo. Roberto sekvis ilin per sia rigardo. Fin-fine la junulinoj malaperis el lia vido. Li mendis ankoraŭ kafon kaj trinkante ĝin ekpensis pri sia deziro, kiun li neniam al iu konfesis, pri sia silenta amo al tiu, kiu nun estas for. Tre malĝoja, li rigardis la flugantan ŝtonan leonon sur la kolono, sur kiu rebrilis sunaj radioj.

— Bone, mi komprenas, kion vi volas al mi memori, - diris al si Roberto. — Vi ne estas vera Leono, sed kimerero. Oni scias, kiel malfacile estas reveni de kimerero al realo.

bildoj de **deŝuvalov Aleksandr**
[Bijisk, Rusio]



Karaj legantoj!

Ĉi tiu artikolo de fama Esperanto-verkisto William Auld lanĉas serion de tre interesaj kaj utilaj por verkantoj kaj ankaŭ por dezirantoj plibonigi la lingvokanon materialoj pri ĝenerala lingvouzado kaj bona stilo.

William. Auld. "Kulturo kaj internacia lingvo", eldono de "Fonto".

Iom pri vortordo

Inter la kvalitoj aŭ karakterizoj de la Internacia Lingvo, nepre menciataj de ĉiuj varbantoj, troviĝas la fleksebleco.

Esperanto estas lingvo fleksebla... Kaj tia ĝi ja estas, dank'al interalie al la akuzativa finaĵo kaj la akordiĝo de adjektivo kun substantivo. Pro tiu fleksebleco, talenta esperantisto kapablas, se li nur havas sufiĉe alt-evoluintan guston, atingi alian gradon de eleganta kaj belsona lingvouzo.

La fleksebleco montriĝas antaŭ ĉio per la vortorda libero. "Plena analiza gramatiko de Esperanto", para.272, komenciĝas:

En E-o la vortordo estas libera, t.e. en ĝi ne ekzistas specialaj vortordo-reguloj, oni devas klopodi nur pri klareco kaj bonsoneco.

Ni rajtas esti tre dankemaj pro tio, ĉar ĝi tre faciligas la lernadon de la lingvo: ĉiu lernanto, kondiĉe ke li

korekte konas kaj sekvas la 16 fundamentajn regulojn, kapablas sin esprimi kompreneble, sen la teda neceso atenti ankaŭ komplikajn regulojn pri la frazkonstruado. Kaj ĉar la frazkonstruado treege varias de lingvo al lingvo etnaj, tiu faciligo estas vere avantaĝa.

...Laŭ "Plena analiza gramatiko de Esperanto", "*La norma vortordo estas: subjekto, predikato, objekto, adjekto. Ŝanĝi tiun normon oni povas, eĉ ofte devas. Tio estas ebla, ĉar la akuzativa finaĵo garantias la nepran rekonon de la frazelementoj. Sed oni ne faru ŝanĝon senkaŭze, ĉar nur tiamaniere oni povas atingi, ke la ŝanĝo signifu ion, ke oni eksentu en ĝi certan nuancon: la akcentadon de iu frazelemento.* Nu, rilate al la ĉiutaga lingvaĵo, kaj ankaŭ al iuj aŭtoroj, kies stilo estas konscie "ĉiutaga", neniu volas disputi, ke la dirita vortordo estas "norma". Tamen, en la verkoj de niaj kolorplenaj prozistoj...kiel ekzemple Baghy aŭ Forge, aŭ sur la paĝoj de, ekzemple, la multadmirata "Literatura mondo", ni ne povas ne konstati, ke tiu "normeco" fariĝas iom svaga, iom dubinda, ĉar tie ĉiuj eblaj de la propoziceroj estas trovebla sur ĉiu paĝo. Evidente eniras novaj kriterioj pri la plej bela, klara kaj eleganta vortaranĝo. Oftegas ekzemple la kombino adjekto- predikato- subjekto:

Post la flankenturnita kurteno oscedis mallumo; En iu angulo sur la tero kuŝis granda bruna maso;... Morgaŭ komenciĝos la granda distrikta foiro;... En la voĉo de la knabino plore vibris io tima, io ĉagrena, k. t. p.

...Tiu aranĝo, cetere, estas kontentige klasika: *En la mondon venis. nova sento.* Instrua povas esti komparo kun la t.n. "norma" aranĝo: *Nova sento venis en la mondon.*

Apud la supozeble norma ordo subjekto- predikato-objekto troveblas - kondiĉe ke la subjekto kaj objekto estas substantivoj kaj ne pronomoj, ĉar kiel PAG prave atentigas (para.274), la pronomoj, estante unu-silabaj, formas apartan kazon - preskaŭ samofte la ceteraj eblaj aranĝoj, precipe objekto-predikato-subjekto: *Vian ploregon glutis la profundo de la kelo; ...Lian sanon la alkoholo neniigis; Liajn okulojn pinĉis la sapsaŭmo k.t.p.*

...La aranĝado de iu propozicio, kompreneble, estas afero unuavice de gusto, kiu baziĝas sur kriterioj pri belsoneco, eleganteco, ekzakteco kaj klareco. Supozeble ĝi fine ne estas reduktebla al reguisistemo - oni devas "aŭskulti al ĝia sono". Cetere, oni ne forgesu, ke propozicion oni konstruas ne en izoleco, sed en rilato al ĉiuj ĉirkaŭantaj gin propozicioj. Oni volas variigi la frazkonstruadon por eviti monotonecon.

Verŝajne la plimultaj stilistoj verkas pli instinkte ol konscie. Se mi rajtas citi ekzemplon personan: Tradukonte la ŝekspiran dramon "Epifanio", mi eksidiĝis antaŭ laŭ unua verso:

If music be the food of love, play on, kaj mi skribis jenon:

Se nutras amon la muziko, ludu.

Pasis kelkaj jaroj ĝis mi rimarkis ke fakte en tiu momento al mi estis ebla elekto inter minimume ses eblecoj, el kiuj la ceteraj kvin estas:

Se amon nutras la muziko, ludu
Se la muziko nutras amon, ludu
Se amon la muziko nutras, ludu
Se la muziko amon nutras, ludu
Se nutras la muziko amon, ludu.

Eble, mi ne scias, iuj legantoj konkludos, ke la plej bonan alternativon mi tamen ne elektis; sed neniu leganto, kiu havas eĉ minimuman sentemon, asertos, ke la plej trafa alternativo estas la "norma", konversacia ordo: *Se la muziko nutras amon, ludu.* En tiu kunteksto ĝi estas nepre la plej malforta. La leciono de tiu historio estas, ke en ĉiu momento la esperanta verkisto, kiam temas pri >>>



vortordo, havas larĝan elekton inter siaj esprimrimedoj. Evidente kaj nature, ĝuste en la poezio ni trovas la plej rafinitan kaj esprimivan lingvaĵon – kaj ĝuste niaj poetoj instinkte (tio estas ilia talento kaj metio) diismetas siajn lingverojn plej efike kaj eluzas la flekseblajn eblecojn de nia sintakso. Tre maloftaj estas poemoj, kies lingvaĵo neniel diferencas de la konversacia lingvaĵo. Ĝenerale, se la vortprovizo estas konversacieca, la poemo ricevas dinamicon per "nenorma" frazkonstruo:

Sanktulinon mi ne vidas
en virina homo,
vane tion predikadis
papa Moŝt' en Romo.
(Mi ne vidas sanktulinon....)

Ĉar poemo sen dinamico jam ne estas artverko sed maksimume nur okaza rimajo (aŭ versaĵo):


Nia Esperanto vivas,
Floras ĉie sur la tero,
Cie nia lingvo servas
Al la bono, belo, vero.

Miaj spertoj ĉe studentoj kaj scivolaj "simplaj" (tiel ili sin nomas) esperantistoj konvinkas min, ke ĝuste la fleksebleco de la vortordo (multe pli ol la literatura abunda vortprovizo) estas la ĉefa malhelpo al senpera kompreno de poemoj flanke de relative senspertaj legantoj. Iom da ekzerciĝo pri analizado de la frazerigo rapide fforigas la barilon kaj la signifojn oni pli kaj pli senpere komprenas, ĝis fine oni atingas legkapablon. Al multaj lernantoj tio efikas kiel revelacio, kaj ili finfine konstatas la veran belon de Esperanto kiel aparta, speciala, ekscita lingvo, kiu stimulas ilian fantazion. Kaj tial ŝajnas al mi malbone, kvazaŭ kaŝi al la lernantoj kaj progresantoj tiun liberigan karakterizon de nia lingvo. Tro multaj esperantistoj en la realeco komprenas la signifon de esperanta frazo nur pere de la norma vortordo kaj ĝuste pro tio mem neniam plenfide regas la finaĵojn akuzativan – kaj ĝuste pro tio kelkaj el ili eĉ rigardas ĝin kiel superfluan! Espereble mi sukcesis atentigi la legantojn pri la granda fleksebleco de la efektive uzata, ne nur en la literaturo, Esperanto...

Vaste konata verkisto kaj instruisto el Brazilo Sylla Chaves afable disponigis por la rubriko siajn instruajn versaĵojn pri bestoj. Ili povas helpi al komencantoj memorfiksi multajn bestonomojn.

Sylla Chaves
[Rio de Janeiro, Brazilo]

Bestetoj, Bestegoj kaj Bestaĉoj



Blankaj cignoj naĝas bele
sur lageto, ĉe la maro...
Ŝvebas mevoj surĉiele,
kaj alflugas hirundaro.

*

Se leon', sen vol' aŭ plaĉo,
irus al Azi', en migro,
tie estus ĝi bestaĉo,
kaj la reĝo estus tigro.

*

En pejzaĝ' kun monda famo,
en river' nomata Nilo,
banas sin hipopotamo,
rinocer' kaj krokodilo.

*

Ran' kaj bufo, unutone,
kantis base, dum la grill'
akompanis violone...
kaj cikado, per fajfil'.

*

La giganto de l' arbaro
estas ja la elefanto,
sed baleno, en la maro,
pli ol ĝi estas giganto

*

Birdoj flugas. Fiŝoj naĝas.
Rampas vermo kaj serpento.
En velŝipo hom' vojaĝas
je la blovo de la vento.

*

La simioj estas bestoj
kun plej granda hom-similo...
Aŭdus tion kun protestoj
la ĉimpanzo kaj l' gorilo.

Estu ne nur en muzeoj
la belaĵoj de l' naturo:
Vivu la paradizeoj,
la fazanoj kaj l' menuro!

Daŭro sekvos

La plej fajna plezuro estas fari plezuron al aliaj

Jan de Labrujer

Aforismoj

Elektis kaj esperantigis **Silkin Viktor** [Kurgan, Rusio]

Jan de Labrujer (1645-1696) – franca verkisto kaj saĝulo, kiu laŭ opinio de Andre Morua, la unua lanĉis ĝenron de aforismoj.

Kia bedaŭro, ke ni vivas ne sufiĉe longe, por lerni el la lecionoj de propraj eraroj.

*

La plej dolĉa el ĉiuj voĉoj en la mondo estas voĉo de virino, kiun ni amas.

*

La tempo plifortigas amikecon, sed malplifortigas amon.

*

Friponoj emas pensi, ke ĉiuj ceteraj similas al ili.

*

Unu el trajtoj de meznivela saĝo estas emo senĉese ion rakonti.

*

Ĉio jam estas delonge dirita, ĉar jam sep mil jarojn sur la tero loĝas kaj pensas homoj.

*

Nur homo nobla laŭ deveno aŭ bone edukita kapablas kaŝi sekretojn.

*


En la malkovro de sekreto ĉiam kulpas tiu, kiu konfesis la sekreton al la aliaj.

*

La viro kaŝas fremdan sekreton pli firme, ol la propran, la virino pli bone gardas la propran sekreton, ol la fremdan.

*

Plej bona rimedo riĉiĝi estas konvinki homojn, ke al ili estas profite fari al vi bonon.



sendis **Silkin Viktor** [Kurgan, Rusio]

Pikemaj aforismoj el Sovetunio

Esperantigis
Cezar [Altenburg, Germanio]

Estas interese, ke tiujn aforismojn Cezar tradukis el la germana, al kiu ili siavice estis tradukitaj el la rusa, el "Literaturnaja gazeta".

Feraj reguloj havas ferajn esceptojn.

J.Jablonski

*

Antaŭ ol vi pruntedonas al amiko monon, pripensu - kio por vi pli gravas.

W.Devjaty

*

Kapablo pensi diferencigas la homojn ne de la simioj, sed unuavice homojn de homoj.

V.Hotĉinskij

*

Nur streĉu vian memoron, kaj vi ĉiam trovos ion, kion vi volas rapide forgesi.

P.Popov

*

Plej multe kostas por ni tio, kion ni tute ne bezonas.

L.Leonidov

*

En la komenco estis la vorto, kaj poste... vortoj, vortoj, vortoj...

W.Maan

*

Ĉio pasas, sed io tamen restas.

A.Davidoviĉ

*

La spirito venkas barilon post barilo, sed la stulteco ne konas obstaklojn.

V.Lebedev

*

Kelkaj laboras en sfero de produktado, aliaj - en sfero de konsumado.

I.Ivanov

Plej oportune estas, se oni portas sian krucon sur la dorso de alia.

J.Jablonski

*

Post farita laboro estas bone ripozi.

Sizifo.

W.Koletcvizki

JANEKDO TOLO

Esperantigis **Burkina Anna**
[Ozersk, Rusio]

— Ĉu la sento de humuro trairas de gepatroj al la idoj?
— Jes, se la gepatroj ne plu havas kion heredigi.

*

Per vorto oni povas ofendi. Per vortaro – mortigi.

*

Du amikoj en kinejo.
— La kvaran fojon mi spektas tiun filmon kaj devas diri, ke hodiaŭ aktoroj ludas pli bone, ol antaŭe.

*

Geedziĝo estas evento, post kiu viro finas aĉeti florojn kaj komencas aĉeti legomojn.

*

— Karulo mia, ĉu vi jam petis ĉe mia patro permeson edziĝi al mi?
— Ankoraŭ ne.
— Sed vi ja promesis...
— Vidu, li havis tiom bonan humoron, ke mi preferis peti ĉe li monon.

*

Junulo aĉetas geedziĝan ringon.
— Bonvolu gravuri sur ĝi “Al Klara de Henry”, mi petas.
Maljuna juvelisto:
— Mi konsilus al vi pli kurtan surskribon: “De Henry”. Por ĉiu okazo...

Kolektis kaj esperantigis **Nik. Somin** [Ŝadrinsk, Rusio]

— Sinjoro, kion vi pensas pri nia gazetaro?
— Ke ĝi ĉiam mensogas.
— Kial?
— Ĉar pasintjare mi edziĝis laŭ gazeta anonco al “bela kaj inteligenta junulino”.

*

Advokato al sia kliento:
— Plej bone en via situacio estas veni al la edzino kaj repaciĝi.
— Interese, kaj kio estas plej malbone?

*

Se edzo donacas al la edzino florojn sen kialo, tio signifas, ke kialo tamen ekzistas.

*

Edzino al la edzo:
— Karulo, ĉu vi ne scias, kie estas nia libro “Kiel travivi 100 jarojn”?
— Mi ĝin forĵetis, ĉar via patrino volis preni ĝin por legi.

*

— Kion fari? Estas katastrofo! La kuracisto diris, ke al mi minacas plena perdo de memoro!
— Ĉu vere? Tial mi pruntepetas ĉe vi \$1000000.

Edzo venis hejmen tro malfrue. La edzino demandas:
— Kie vi estis?
— Strikis.
— Kaj kion vi atingis?
— Laboron, kiun mi ne faris tage, mi estis devigata fari vespere.

*

Malfrua nokto. La policisto haltigas ebrian viron.
— Kien vi tiom rapidas?
— Al la lekcio.
— Kiu tiom malfrue faras lekciojn?
— Mia edzino al mi.

*

Edzino al la edzo:
— Venu.
— Nu jen, ĵus mi eksidis...
— Kaj kion vi faris ĝis tio?
— Kuŝis.

*

Kuracisto demandas pacienton:
— Tiun vundajon vi ricevis rezulte de aŭtoakcidento?
— Jes!
— Verŝajne, vi tro rapide veturis?
— Ne. Tro malrapide paŝis.

Ŝulepin Aleksej [Osa, Rusio]





- Amiko mia, ĉu vi povas pruntedoni al mi \$10000?
- De kie mi ilin prenu? "Mi ne estas ja bankisto!"

Voĉo el radio:
- Vi aŭskultis teatraĵeton **"Estas mi esperantisto"**.

— Foje mi estis en la lando, kie ĉio estis verda – la grundo estis verda, la akvo estis verda, la domoj estis verdaj, la ĉielo estis verda, la noktaj steloj estis verdaj, la pano kaj kolbasoj estis ankaŭ verdaj...

Voĉo el radio:
- Vi aŭskultis teatraĵeton
"Rememoroj de 100%-a esperantisto".

- Kara mia, mi volas fari vin feliĉa !
- Kaj vi edziĝos al mi?
- Ho jes, certe!

Voĉo el radio:
- Vi aŭskultis teatraĵeton **"Kredu min, sinjorino!"**

- Karulino mia, ĉu vi volas, ke mi metu la tutan mondon al viaj piedoj?
- Jes, kara!

Voĉo el radio:
- Vi aŭskultis teatraĵeton **"Iluzioj"**

- Kara mia, kie vi estas?

Voĉo el radio:
- Vi aŭskultis teatraĵeton **"Gerda malaperis"**.

- Kara mia, akceptu de mi tiujn belajn florojn! Ĉu mi povas kisi vin?
- Ah! Kara...
- Kaj por dimanĉo mi invitas vin ripozi ĉe naturo...
- Estas tre agrable!

Voĉo el radio:
- Vi aŭskultis teatraĵeton **"Paŝoj al plena posedo"**

Ĉi tiujn mallongajn kaj spritajn teatraĵetojn vi povas uzi kiel distraĵojn dum E-klubkunvenoj aŭ aliaj E-aranĝoj.

Kurtaj radio- teatraĵetoj

Kudrjavcev Viktor [Jekaterinburg, Rusio]

- Kie vi estis, mensogulo?
- Mi drinkis kun la amikoj en drinkejo.
- Sed de kie sur viaj vangoj estas spuroj de virinaj lipoj? (Aŭdiĝas: **Frap'!** - **frap'!** - **frap'!** - **frap'!** - **frap'!** - **frap'!** - **frap'!!!**)

Voĉo de radio:
- Vi aŭskultis teatraĵeton
"Sep vangofrapoj"

- Amiko mia, mi vidas, ke vi konstruas novan domon.
- Jes, mi jam faras la fundamenton.
- Estas bona fundamento! -- (frapetas per manplato laŭ brikoj).
- Hej, ne tuŝu la fundamenton, ĝi povas disfali!

Voĉo el radio:
- Vi aŭskultis teatraĵeton
"Netuŝebla Fundamento".

Du konatoj:

- Amiko mia, mi aŭdis, ke vi vizitas kurson de internacia lingvo Esperanto?
- Ho, jes!
- Por kiu celo vi ĝin bezonas?
- Por fariĝi Prezidanto de Esperanto-klubo!

Voĉo el radio:
- Vi aŭskultis teatraĵeton
"Superforta ambicio".

En turista agentejo.

- Mi volas akiri ekzotikan vojaĝturneon.
- Se vi volas viziti misteran ekzotikan landon, lernu la internacian lingvon Esperanto kaj la tuta mondo okazos antaŭ vi!

Voĉo de radio:
- Vi aŭskultis teatraĵeton
"Vojaĝo en Esperanto lando".

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj kaj 2 eŭrojn por ĉiuj ceteraj. Por abonantoj de "K" - senpage.

Mi estas 21-jara studentino. Intereso: geografio, naturo, literaturo, pentrado, sporto, muziko.

Kornjuhina Anna
Altajskij kraj, 656015,
Barnaul, Depovskaja, 20-27

Rusio

esperi@uic.asu.ru

Mi estas 64-jara sinjorino. Int.: muziko kaj lingvo.

Rosemarie Bender
Im Grund 9
57518 Betzdorf
Germanio
rosemarie.bender@web.de

Mi estas 19-jara komencantino, studentino. Int.: libroj, pentraĵoj, vojaĝi. Mi volas korespondi kun geesperantistoj kun bizaraj intereso. Aĝo ne gravas.

Stephanie Jones
Cary, Nord Karolino,
Usono
stephanie.r.jones@gmail.com

Mi estas viro 52 jara. Mi estas edukisto en handikapulejo por junularo. Mi deziras korespondi pri ĉiutaga vivo.

Francisko Horaček
Brno
Ĉeĥio
frantisek.horacek@volny.cz

Mi estas mez-nivela esperantisto, profesoro de teatro, verkisto kaj muzikisto. Int.: literaturo, Bahai-movado. Mi ŝatus havi kontaktojn kun Japanio aŭ aliaj lokoj de Azio.

Abel Bustos
San Pedro, Jujuy
Argentino
abelbustos@hotmail.com

Mi estas ĉina esperantistino, 23-jara, kiu emas pacon, harmonion kaj amikecon. Mi volas korespondi kun alt-nivelaj esperantistoj, kiuj ŝatas vivon kaj volas interŝanĝi opinion pri la vivo kaj la mondo. Mi estis helpantino kaj ĉiĉeronino en la 2004 UK en Pekino. Aĝo, sekso kaj religio ne gravas.

Lina Chen
Pekino
Ĉinio
aassii929@hotmail.com

Mi estas 17 jara fraŭlo, progresanto. Mi ŝatas scienc-fikcion, komputilojn, Esperanton kaj klasikan muzikon. Mi ankaŭ ŝatas konatiĝi kun kulturoj de diversaj popoloj, tial mi volas korespondi kun geesperantistoj el la tuta mondo. Religio, sekso kaj aĝo ne gravas.

Facundo Carabajal
San Pedro,
Jujuy
Argentino
elenigmadelmundo@hotmail.com

sendis Zujeva Margarita [Moskvo, Rusio]



Mi estas komencanto, dez. kor. por plibonigi mian Esperanton. Int.: birdobservado, piedekskursi, muziko.

s-ro *Thierry Tailhades*
61 rue Henri Gorjus
69004 Lyon,
Francio
thierry.tailhades@wanadoo.fr

22-jara komencanto deziras korespondi tutmonde por plibonigi sian Esperanton.

Dogadin Dmitrij
bv. Engelsa, 29—154
Volgograd
RU-400026
Rusio

Mi estas 49 jara inĝeniero. Mi serĉas esperantistojn-filatelistojn por reciproka interŝanĝo de poŝtmarkoj, ankaŭ tiujn, kiuj interesiĝas pri pm, emisiitaj (-otaj) en nuntempa Ukrainio aŭ en eksa Sovetunio.

Vjaĉeslav Vasiljev
p/k 31,
u. Lugansk, UA-91005,
Ukrainio
anelav@ua.fm

Mi estas 61 jara emerito, loĝaŭtisto. Int.: Krei loĝaŭtisto-klubon por interŝanĝi adresojn de parkejoj. Konatiĝos kun Eŭropaj loĝaŭtistoj.

Max Claude
317 Chemin du Castellas
84200 - Carpentras
Francio
maks@max-claude.com
http://max-claude.com/esperanto

Mi uzas Esperanton jam 50 jarojn. Mi ankoraŭ laboras en teatro kiel fajrogardisto. Al mi plaĉas bicikladi en naturo, foti. Mi ankaŭ ŝatas arton, muzikon, mi kolektas teosaketetojn, sukersaketetojn.

Vala Karel
Cajkovskeho 14 a
78701 Šumperk,
Ĉeĥio
valakarel@centrum.cz

Mi estas 22-jara fraŭlino, komencanto, infanĝardenista instruistino. Mi ŝatas lemi lingvojn kaj koni fremdajn kulturojn, tial mi volas korespondi kun ĉiuj, aĝo ne gravas. Mi kolektas bildkartojn kaj ankaŭ deziras interŝanĝi. Int.: skribado, legado, kino, muziko, pentrado per oleofarbo, ŝako, historio.

Fátima Jimenez Garcia
C/Árbol N° 7 1° B
C.P: 29400
Ronda (Málaga)
Hispanio
cartas_esperantas@yahoo.es

Mi estas 21 jara fraŭlo, studento, muzikisto amatora, kaj gubernisto por latina lingvo, muziko kaj historio. Mi loĝas en la insularo de Hawaii. Mi volas koresp. kun aliaj junaj homoj.

Sky Roversi-Deal
P. O. Box 723
Kilauea, HI 96754
Usono
alwaysbringyourtowel@gmail.com

komencanto@r66.ru
http://Komencanto.narod.ru
viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

